

Nacilingvaj varbfolioj por verduloj neesperantistaj

Jen skizo de teksto por varbfolio pri la valoro de Esperanto destinita al verduloj kiuj ankoraŭ ne ekkomprenis la helpon kiun povus doni la Internacia Lingvo al la Verda Movado.

1. Ni verduloj bezonas internacian lingvon por superi la lingvajn barierojn kiuj disigas nin de samideanoj en aliaj landoj.

2. Pro la internacieco de ekologiaj problemoj ni konstatas la neceson enkonduki internacian lingvon kiel komunikilon en la kampo de tutmonda Verda agado.

3. Estas netaŭge, pro nia intenco protekti kulturen diversecon, ke iuj naciaj lingvoj ricevu privilegiojn super aliaj.

4. La lingvoj plej ofte uzataj en internaciaj konferencoj estas tiuj ligitaj al estinta imperialismo (kaj ofte imperialismo lingva) kaj al estanta ekspluatado ekonomia.

5. Por ligi verdulojn tra la mondo, ĉiuj el ni bezonas, krom la gepatran lingvon, politike neŭtralan lingvon kiu estas samtempe nemalfacile lernebla de homoj el diversaj landoj.

6. La plej taŭga - verŝajne la sola - kandidata lingvo por tiu tasko estas Esperanto, lingvo ne nur aprobatata de Unesko sed ankaŭ en pli ol cent landoj (aparte, ekzemple, Brazilo, Ĉinio kaj Hungario) kaj lastatempe pli kaj pli en la tielnomata Tria Mondo.

7. Inter la organizaĵoj kiuj jam uzas Esperanton estas: Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, Eŭropa Klubo, Sennacieca Asocio Tutmonda, Universala Ligo por Mondunuiĝo, Internacia Asocio por Monda Turismo, Internacia Kibernetika Asocio, kaj Internacia Asocio por Mondcivitaneco.

*** Karaj legantoj! Vi estas invitataj plibonigi kaj ampleksigi la ĉi-superan tekston; kaj ni petas ke vi sendu la rezulton al nia Sekretario antaŭ la 15a de Novembro.

Pri la venonta numero de Aveno

Aveno n-ro 1 estos kompreneble pli ampleksa, sed longajn artikolojn ĝi ne enhavos. Ni esperas ke baldaŭ inter nia legantaro estos multaj komencantoj, kaj ili (kaj ne nur ili!) pli volonte legos informojn kaj stimulaĵojn ol du/tri-pagan tezon. Tamen ekster la bulteno ni intencas eldoni kiel eble plej multajn tekstojn. Limdato por Aveno 1: 15 Nov.



AVENO n° 0

«varonjara bulteno de la

Asocio de Verduloj Esperantistaj

Place de la Station 16, 7790 Warneton, Belgio

Redaktoro de "Aveno": Christopher Fettes
St Columba's College, Dublin 16, Irlando Resp.

Provnumero - Oktobro 1984

Vortoj de la Redaktoro

Tiu ĉi nova esperantista bulteno rezultas de deziro en la koro de multaj Verduloj. Sed kio estas Verdulo? Nu, la Verda-Movado mem estas la kreskanta politika kaj eksterpolitika movado bazita sur ekologiaj principoj; kies subtenantojn oni povas perkomprenebla idiotismo nomi Verduloj. Kaj ĉi tian bultenon bezonas ne nur Esperantistoj "verdaj" sed ankaŭ tiu movado mem.

Pri la origino de AVE vi legos en la vortoj de nia Sekretario, Jean-Claude Thumerelle, sur la dua paĝo; pri ties estonteco respondecos kompreneble vi ĉiuj kiuj aliĝos al nia asocio. Pri AVENO (tio estas AVE-NOvaĵoj) respondecos mi mem ĝis nia asocio estos pli bone establita. Ĝi aperos en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro; sed nepre notu ke ĝi neniel estos rivalo al EKOPERANTO (kiun mi nun eldonas sed ne redaktas), ĉar tio ĉi devas resti politike neŭtrala, dum la kontribuantoj al AVENO povos senti sin liberaj por subteni aŭ ataki ian ajn politikan kredon laŭ ties ekologia vidpunkto kaj agado.

Do, ekskribu !



Via Redaktoro

Vortoj de la Sekretario

Skiza historio de AVE. La ekologia politika movado estas nova kaj disvolviĝanta realeco en diversaj eŭropaj landoj. La lastaj elektoj por la Eŭropa Parlamento montris klare la efektivan ĉeeston de la verduloj en la politika vivo.

Je la fino de la marta monato de '84 kelkaj esperantistoj, kiuj ĉu jam aktive agadas en ekologiaj naciaj partioj aŭ movadoj ĉu estas tre favoraj al la ekologiaj principoj, kunvenis en Bruselo ĵus antaŭ la unua kongreso de la Eŭropaj Verduloj en Liĝo. Tiu kunveno naskis AVE-n, kies ĉefa celo estas disvastigi kaj apliki Esperanton en la Verda Movado (t.e. la politika kaj eksterpolitika movado bazita sur ekologiaj principoj).

KAJ NUN ? Ĉio estas farota !

Post kiam la jarlibro de U.E.A. sciigis pri nia nove kreita asocio, tuj kelkaj ekologiistaj esperantistoj kontaktis nin por proponi sian kunlaboron. Tio estas bona afero kaj ni devas nun serioze pripensi kiamaniere ni povas organizi efikan internacian kunlaboron por la verduloj.

Ŝajnas, ke la unua tasko de AVE estas krei efikan ligilon inter la verduloj kiuj en sia lando agadas por konigi kaj akceptigi Esperanton en la ekologiaj naciaj movadoj. Rilate tion la kolekto kaj publikigo de informoj el diversaj landoj estos sendube utilaj al ĉiuj. Alia tasko de AVE estas helpi la esperantistojn kiuj laboras en la verdaj movadoj, proponante al ili materialon en diversaj naciaj lingvoj.

Aliparte restas ankoraŭ grava laboro, kiun AVE (kun la helpo de ĉiuj!) povas plenumi. Tio estas la esperantigo de kelkaj interesaj tekstoj de la naciaj ekologiaj movadoj. Tio permesus al ĉiu AVE-ano pli bone koni la tezojn kaj agadojn de la Movado ekster sia propra lando, kaj tiuj tradukoj estus ankaŭ bonaj propagandiloj en la naciaj verdaj medioj.

Kompreneble, por efektiviĝi tion ni bezonas vian kunlaboron, viajn proponojn kaj viajn kritikojn....

-Claude Thumerelle



La Verduloj en Eŭropo

Post la lastaj elektoj por la Eŭropa Parlamento*, oni vidas ke la Verda Movado precipe progresis en norda Eŭropo kaj en la urboj. Jen la ĝeneralaj rezultoj en la diversaj landoj: (sed notu ke, ĉar ne ĉiuj landoj uzas la saman balotsistemon, la rezultoj ne estas facile kompareblaj):

Belgio "Agalev" (Flandrio) kaj "Ecolo" (Valonio) gajnis 8.2% de la voĉdonoj, kaj 2 seĝojn el 24.

Britio "Ecology Party" prezentis nur kelkajn kandidatojn.

Danlando Ne estis verda kandidato en tiu lando.

Francio "Les Verts" ricevis 3.4% de la voĉdonoj, sen seĝoj.

Germanio "Die Grünen" ricevis 8.2% de la voĉdonoj, kaj 7 seĝojn el 81.

Greklando Ne estis verda kandidato en tiu lando.

Irlando Resp. "Comhaontas Glas" prezentis nur unu kandidaton (la redaktoro de Aveno!).

Italio La iom verda "Partito Radicale" ricevis 3.4% de la voĉdonoj, kaj 3 seĝojn el 81.

Luksemburgio "Di Greng Alternativ" gajnis 6.4% de la voĉdonoj, sen seĝoj.

Nederlando "Groen Progressief Akkoord" (alianco de netute verdaj partioj) gajnis 5.6% de la voĉdonoj, kaj 2 seĝojn el 25; "De Europese Groenen" (nova kaj pli "pure" verda partio) gajnis 1.3% de la voĉdonoj, sen seĝoj.

* La tielnomata "Eŭropa" Parlamento fakte reprezentas nur 10 el 30+ eŭropaj ŝtatoj; eble EK-Parlamento estos pli taŭga nomo en estontaj numeroj de Aveno.

* * * * *

Estas konata fakto ke tielnomataj Verduloj ne tute samopiniias pri tio kio estas verdismo; pro tio estas du - aŭ eble pli - grupoj, en kelkaj landoj, kiuj proklamas ke nur ili estas vere verdaj. Aveno klopodos speguli la opiniojn de ĉiuj....